# Informilo

Monata revuo de la estraro de FEL - 11a j. n-ro 4, jun. 1991

## Estraro

*Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

8a de junio 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts

### 1.1 Buĝetkontrolo

La membroj de la komisiono kontrolis la spezokonton sed ne renkontis gravajn deviojn kompare al la pasintaj jaroj. La tuta spezaro estas iom pli pozitiva ol en 1990.

### 1.2 Investoj

La komisiono rekomendas al PP ne pli longe atendi kaj jam nun aĉeti Atari-TT-komputilon, tiel ke la ekmaluzo de la Digital-komputilo povu okazi iom post iom. PP konsultos Fred de Geus kaj poste mem decidos pri la dato de aĉeto.

### 1.3 Eldona agado

Estas prespretaj *Meznokto metropolitena* de Krys Ungar kaj *Sub influo de alkoholo* de J.H. Sullivan. La unua aperos kiel verko 14 en la Stafeto-serio. La poemaro de Krys Ungar devus esti preta antaŭ la UK de Bergen; la novelaro de Sullivan iam aŭtune.

Post la ferioj de nia kompostisto Guido van Damme, estos finkompostata *Ŝirpecoj* de Christian Declerck kaj ekkompostata la nova Esperanto-gramatiko.

*Renardo la Vulpo* kaj *La komencanto* ambaŭ daŭre kuŝas en la tirkesto de Petro de Smedt.

La historian libron pretas revizii Ulrich Lins. Ni nun atendas lian (mal)benon.





Baldaŭ povos aperi la Esperanto-dokumento *Naar één taal voor Europa?* kiun tradukis Verloren van Themaat kaj kompostis Jean Pierre Allewaert.

Por ke libroservoj ne hezitu mendi niajn eldonaĵojn, ID proponas ke tiuj kiuj mendas ĉiujn librojn de FEL rajtu ĝis unu jaro post fakturdato resendi nevenditajn verkojn, kiujn FEL rekreditos. Akceptita. PP informos la libroservaron.

### 1.4 Halbart

FEL estis vokita antaŭ la malsupera tribunalo *(Vredegerecht)* en la konflikto kun la ekspedfirmao Halbart Express. Nia advokato konsilis ne iri sed skribe klarigi kial FEL rifuzas pagi la fakturon, nome ĉar ni postulas de Halbart pli grandan sumon pro fuŝoj faritaj.

### 1.5 Provlegado de *Monato*

La estraro unuanime opinias, ke provleganto de *Monato* estu pagita, same kiel ĉiuj aliaj kunlaborantoj.

### 1.6 Ŝlosilo de la Esperanto-domo

Unu fojon pli Iwona Kosięba petis ke ŝi ricevu ŝlosilon de la Esperanto-domo, ĉar la aŭtomata malfermilo jam dufoje ne funkciis. Por eviti ke io simila ripetiĝu, oni provos en baldaŭa estonteco instali pli fidindan sistemon.

La cifera kodo por povi eniri la Esperanto-domon ŝanĝiĝos la 1-an de septembro matene. La personoj kiuj rajtas eniri la domon estas petataj peti la novan kodon ĉe Clara Claes aŭ Paul Peeraerts. Al tiuj personoj ni memorigu denove, ke ili ne propraîniciate povas komuniki la kodon al aliaj personoj.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj tri plus Alex Humet, Jean Pierre Allewaert kaj Peter Berx.

### 2.1 Antaŭaj protokoloj

Neniuj rimarkoj.

## 2.2 Alvoko IKEL pri Armenio

Internacia Komitato pri Etnaj Liberecoj (IKEL) dissendis peton de la Armeniaj esperantistoj diskonigi kiel eble plej multe la genocidon kiu nun estas okazanta en Armenio. Sekvas vigla diskuto ĉu FEL jes aŭ ne eniru tiajn aferojn. Finfine la estraro proponas al la redaktoro de *Horizontaal* aperigi la tekston. Krome ĝi petas ne fari nun gazetaran komunikon pri ĝi (ĉar kelkaj gazetoj jam raportis) sed estonte tuj plusendi tiajn novaĵojn al la gazetaro.

ID kontaktos kun Amnestio Internacia kaj informpetos ĉu ambaŭ organizaĵoj povas iel kunlabori.

## 2.3 Vizito de FEL-estraranoj al lokaj kluboj

La estraro ripetas, ke ĝi pretas viziti la estrarkunvenojn de lokaj grupoj por priparoli eventualajn problemojn, kurantajn aferojn, ktp.

## 2.4 ILEI-ekzamenoj

Laŭ peto de ILEI FEL organizos, verŝajne en septembro, unuagradajn Esperanto-ekzamenojn. Personoj kiuj interesiĝas pri tiuj ekzamenoj, prefere aĉetu por prepari sin la libreton "Internaciaj ekzamenoj" ĉe FEL aŭ ĉe sia loka libroservo.

## 2.5 Projekto *Horizon-taal*

Post testo en la Antverpena universitato en 1990, FEL ŝatus ripeti la kampanjon *Horizon-taal* en ĉiuj universitataj urboj de Flandrujo, kunlabore kun la lokaj grupoj. ID kontaktos tiujn grupojn por klarigi. La duonon de la kostoj FEL pagos. AH petos al Pieter Vets surpaperigi siajn spertojn pri la antaŭa jaro. Tiujn ni povos sendi al la kunlaborantaj grupoj.

## 2.6 Vidbendservo

FEL iom post iom starigos servon per kiu la lokaj grupoj povos prunti esperantlingvajn vidbendojn. La luprezo estos inter 100 kaj 500 frankoj + afranko, depende de la valoro de la bendo. Kiel garantion la grupo liveru ankaŭ ĉekon, kiu estos enkasigita nur okaze de perdo de la bendo. La centro faros regule liston de la akireblaj bendoj kaj havigos ĝin al la grupoj.



## 2.7 Programoj en *Horizontaal*

Ĉar la poŝto iĝas pli kaj pli malfidinda, kaj ĉar *Horizontaal* ne ĉiam akurate aperas, JV proponas ke la grupoj povu havi la eblecon aperigi trimonatan programon el kiu la tria monato ripetiĝus en la posta numero. La estraro aprobas la ideon.

Protokolis PP.

STATISTIKO PRI ESPERANTO EN LA KOMUNIKILOJ.

JAROJ 87/88/89/90.

| MONATO | MENCIO | MALGR. ART. | GRANDA | RADIO+TV |
|---|---|---|---|---|
| Januaro | 0/2/0/1 | 3/3/0/3 | 2/4/0/5 | 11/0/0/? |
| Februaro | 0/3/4/0 | 6/0/0/1 | 10/9/0/3 | 4/0/0/? |
| Marto | 0/4/1/2 | 7/1/1/7 | 8/2/0/2 | 5/0/0/? |
| Aprilo | 0/6/0/0 | 4/4/0/4 | 4/2/0/3 | 0/0/0/? |
| Majo | 0/5/1/0 | 6/4/0/2 | 0/3/1/2 | 0/0/0/? |
| Junio | 0/1/2/1 | 9/4/6/4 | 7/5/5/9 | 2/0/0/? |
| Julio | 0/4/1/1 | 9/4/5/0 | 3/5/14/5 | 0/0/0/? |
| Aŭgusto | 2/0/5/0 | 11/5/9/4 | 3/6/9/6 | 0/1/0/? |
| Septembro | 3/1/6/2 | 7/2/6/7 | 8/4/7/10 | 3/1/1/? |
| Oktobro | 7/3/7/1 | 11/6/9/6 | 4/3/5/0 | 1/0/0/? |
| Novembro | 0/1/1/0 | 2/2/0/5 | 3/1/3/1 | 0/0/0/? |
| Decembro | 14/1/0/0 | 0/1/4/1 | 10/2/2/1 | 3/2/0/? |
| SUMOJ | 26/31/28/8 | 75/36/40/44 | 62/46/46/47 | 30/4/1/16 |


Nombro da pritraktitaj informpetoj en la centro 248 (115 en 89)

PROTOKOLO PRI LA STUDOTAGO DE LA 27a DE APRILO 1991
sub gvidado de Kees Ruig
"PLI CELTRAFA KAJ HARMONIA KUNLABORO INTER LA GRUPOJ KAJ LA CENTRO DE FEL".

Komenciĝo: 10a h.
Finiĝo: 17a h.
Partoprenis: Peter Bercx, Jan Bovendeerd (AT), Jan Devillé, René De Clerck, Thérèse kaj André D'Hulster, Ivo Durwael, Rob Ebenau, Jan Hansen, Alex Humet, Kees Ruig, Mireille Storms (PT), Pieter Vets.

I. TEORIO: ENKONDUKO EN MERKATADON.

Merkatado montriĝas inda tekniko por pliboniĝi la rezultojn en la Esperanto-movado, ĉar "ĝi estas rimedo por atingi sian celon en situacioj, kie devigoj ne eblas aŭ ne taŭgas".
Oni povas bildigi la tri esencajn elementojn de merkatado per la ĉi suba skemo:




Unue ni klare devas difini nian celon. Ce la plimulto de la homoj, kiuj aktivas en societo mankas perspektivo (kion ni finfine volas atingi en kiom da tempo) kaj ankaŭ konkreta bildo kiel ni volas provi por realigi tion. Tiuj du ecoj ne estas rezervitaj por viziuloj aŭ manaĝeroj. Post iom da pensekzerco, ĉiu el ni povas plispertiĝi. Foje mem elprovu tion.

Unue ni notu kiu estas la celo de nia klubo. Verŝajne oni respondos per deziresprimo, ekz. disvastigi Esperanton en nia urbo kaj ĉirkaŭajo. Provu nun konkretigi tion, ekz. trovi 100 novajn kursanojn en 5 jaroj, el kiuj la duono ekuzas Esperanton por



internaciaj kontaktoj. Poste ni ripetfoje demandu al ni kial ni volas atingi tiun celon, ĝis ni ne plu sukcesas trovi respondon. Ekz. Kial ni volas akiri cent kursanojn, kiuj ekuzas Esperanton? Ju pli da novuloj, despli agrable kaj interese estas la okupiĝo pri Esperanto. Kial ni volas okupiĝi pri Esperanto? Car ni volas fari ion bonan por la homaro en nia vivo? Kial ni volas fari ion bonan por la homaro? Car tio kontentigas nin? Kial tio kontentigas nin? Ni ne plu scias, eble ni naskiĝis kun tiu sento, eble tio estas celo de nia vivo. Vi notu la respektivajn respondojn super la unua ĝenerala celo.

Sub ĉiu linio, vi notu kiu estas la ilo por realigi la ĝeneralan celon kaj ankaŭ la subcelojn. Ekz. Ilo por atingi nian ĝeneralan celon: informadi 10 000 gestudantojn pri la eblecoj de Esperanto kaj la ekzisto de niaj kursoj. Ilo por subceloj: partopreni en ferioborso, aperigi 10 artikolojn en lernejaj gazetoj, organizi 20 informajn prelegojn en lernejoj ktp.

Vi malkovros, se vi faras tiun ĉi ekzercon en la estraro de via klubo, ke vi rapide atingos pli klaran bildon pri la eble ĝis nun kaŝitaj intencoj en via skipo, kaj povos multe pli celtrafe labori se vi kune sukcesas difini konkretajn atingotaĵojn.

Poste, ni difinu niajn celgrupojn. Ni eltrovu kiaj kaj kiuj homoj interesiĝas pri niaj ideoj kaj kio allogas ilin. La priskribo de la celgrupoj havu kiom eble plej multe dakarakterizoj kiel ekz. aĝo, sekso, opinio pri Esperanto, rezistoj, aĉetmotivoj, kion oni studas(is) kaj kie, kie oni pasigas la liberan tempon ktp.

Fine ni povas pensi pri tio, kion ni volas kaj povas oferti al tiuj homoj.

Motivoj por "aĉeti" ion estas: sekureco, progreso, komforto, ĝuo, solidareco, noveco, ekskluziveco, avantaĝoj. En nia kazo, "aĉeti" povas signifi: enskribiĝi

por Esperanto kurso, membriĝi, uzi Esperanton por internaciaj kontaktoj, aĉeti librojn ktp. Por ĉiuj tiuj eblecoj necesas ekzameni kiuj motivoj validas.

Por bone prezenti oferton ankaŭ necesas pensi pri AIDA: ni unue kaptu la Atenton, poste eble venas Interesiĝo, se ni alloge prezentiĝas sekvas Deziro kaj fine Agado, tio estas Aĉeto de iu el niaj servoj.

Por ne senkuraĝiĝi se ni ne trovas la eĥon, kiun ni esperis, ni sciu, ke 80 % de la produktoj, kiuj surmerkatiĝas malsukcesas. El la restantaj 20 %, 10 % malaperas, ĉar oni ne verigas la promesojn kaj sekve trompitaj klientoj turnas la dorson al la ofertitaĵo.

Por influi homojn necesas pozitiva aliro al interesitoj. Tial ni neniam kritiku la konkurantojn. Ni ne defendu nin, sed manifestu memfidon. Ni emfazu la avantaĝojn de tio kion ni prezentas, kaj eventuale informpetu pri la negativaj ecoj de la konkurantaro sed lasu ilian priskribon al la interesito. Evidente necesas bona kono de la propra servo kaj de la konkurantoj.

Por maksimume "vendi" nian oferton, ni devas kontroli, ĉu ni ekvilibre atentis pri la 6 elementoj de la "merkat-miksaĵo": Produkto, Prezo, Pozicio, Personaro, Propagando, Pledantoj.

Produkto rilatas al ĉio, kion ni volas oferti al la publiko.
Prezo rilatas ne nur al la prezo por kurso aŭ kursolibro, sed ankaŭ al la tempo kaj energio, kiun la kursanoj investas.
Pozicio rilatas al la lokoj, kie ni aperas aŭ kie ni organizas ion.
Personaro rilatas al la dungitoj de la Esperanto-centro, sed ankaŭ al ĉiuj aktivaj Esperantistoj.
Propagando rilatas al ĉio, kion ni faras por diskonigi niajn aktivecojn.
Pledantoj rilatas al tiuj homoj, kiuj povas influi la opinion de aliaj homoj. Ekz. instruistoj, renomaj




personoj, gvidantoj de aliaj societoj sed ankaŭ kontentaj antaŭaj kursanoj.

Ĉar la oferto pri Esperanto-eblecoj en Flandrio (kursoj, kluba vivo, literaturo, revuoj...) jam ekzistas, ni povus ankaŭ komenci la proceson ĉe oferto kaj listigi kion ni jam disponigas, ekzameni ĉu ni atentis la ingrediencojn de la merkatmikso, kontroli ĉu nia oferti kongruas kun nia celo kaj nur triapaŝe eltrovi kiujn celgrupojn ni povus alparoli.

II. PRAKTIKO EN DU LABORGRUPOJ.

Unu laborgrupo devis unue difini siajn celojn kaj poste trovi celgrupojn por kontentigi la celojn.

CELDIFINO




Motivoj, kiujn ni povas kontentigi: ĝuo, solidareco, avantaĝo, progreso.

CELGRUPOJ

Por la kreo de internacia etoso: tiuj, kiuj studis pli ol mezlernejon. Tradiciaj sukcesgrupoj en la movado: informatikistoj, instruistoj, medicinistoj. vojaĝemuloj, precipe studentoj, kiuj interesiĝas pri malmultekostaj vojaĝeblecoj.

Por la instigo al internacia solidareco: ekologiistoj, verduloj, ĵurnalistoj, raportistoj ktp de la komunikiloj, eŭropaj politikistoj.

Dua laborgrupo devis unue difini celgrupon kaj ekzameni ĉu ni disponas pri taŭga produkto.

CELGRUPO:

aĝo: prefere inter 18 kaj 26-jaraĝa;
interesiĝo: homoj, kiuj jam internacias kaj interesiĝas pri pli da internaciaj kontaktoj;
profesio: studentoj
deziroj: sendependiĝemo, emo al plilarĝigo de horizontoj, novaj sociaj kontaktoj, ĝuo kaj amuziĝo

PRODUKTO:

Motivoj, kiujn ni povas kontentigi: komforto, ĝuo, solidareco, noveco, ekskluziveco, avantaĝoj, progreso. Ni povas oferti Pasporta-n Servo-n, kiu plenumas jenajn motivojn: avantaĝojn, ekskluzivecon, novecon, solidarecon. Aldone necesas krei kursojn adaptitaj al tia publiko kiu celu precipe la tujan uzeblecon de la Pasporta Servo per ekzercado de konversacioj pri ordinaraj dumvojaĝaj situacioj.

III. PLANO PRI KOMUNA CELO.

Ĉar la du laborgrupoj sendepende venis al la ideo ke studentoj, kiuj serĉas malmultekostajn vojaĝeblecojn estas bona celgrupo, la kunveno proponas, ke ĉiuj kluboj en Flandrio laŭeble subtenu kaj partoprenu en septembro ĉi jare kampanjon ĉirkaŭ la eblecoj de Pasporta Servo kaj provu organizi adaptitan kurson por gestudentoj. Tio evidente ne signifas malpersmeson al la kluboj por varbi en aliajn mediojn, sed jes inviton por krome kunagadi por realigi jenan komunan planon.

Produkto: Pasporta Servo kaj adaptitaj kursoj, kiuj rapide kondukas al la ebleco por uzi ĝin. Tio devigas



nin por instigi ĉe TEJO je la kontrolado de adresoj kaj varbado de novaj gastigantoj precipe inter gejunuloj. Ni almenaŭ povas komenci per kontrolado kaj varbado en Belgio.

Pozicio: ni prefere provu organizi ion en lernejoj aŭ ejoj, kie studentoj jam regule venadas.

Prezo: kursomono, kiu inkluzivu la aĉeton de PS-broŝuro.

Propagando: ni devas precipe pruvi ke la elspezota mono kaj tempo kondukas postaj avantaĝoj kaj ŝparoj. Disponeblas afiŝoj kaj flugfolioj de la kampanjo Horizontaal. Ni provu aperigi informojn en studentaj gazetoj.

Personaro: Pieter Vets kaj Alex Humet por la centro + ĉiuj klubgvidantoj.

Pledantoj: direktoroj de lernejoj, studentaj organizaĵoj ktp.

Supozeble vi rimarkas, ke tiu ĉi plano ne jam sufiĉe konkretas kaj ne klare difinas la kontribuon de la Esperanto centro kaj la taskon de la lokaj kluboj. Sendube vi ankoraŭ ricevos pli da informoj, petoj kaj instrukcioj en la venontaj monatoj. Ĉefas ke - post la legado de tiu ĉi raporto - en ĉiu grupo oni jam pripensu kiel eblas partopreni en la proponita kampanjo.

Ĉe la fino de la kunveno, ges-roj D'Hulster esprimis sian seniluziiĝon, ke tiom da kluboj ne reprezentiĝis, kiam ni disponas pri interesega prelegonto kaj kiam ni provas estigi pli da kunlaboro inter la kluboj.

Protokolis: I.D.

**Estrarkunsido de FLEJA je 1/6/91 ĉe Patrick Haerick en Wondelgem**

ĉeestantoj: An Alberto, Patrick Haerick, André Ruysschaert kaj Eddy Van den Bosch.

1. Antaŭa protokolo

Jean Pierre intertempe transdonis la ĝustan FLEJA-membronpmbron al BEF.
Laŭ informoj kiujn akiris Patrick, Pasporta Servo ne jam reaperis, sed ŝajne estas preparata senŝanĝa represo de la antaŭa eldono.

2. Financoj

Eddy prezentas la financan jarraporton por 1990 kaj klarigas ke:
- Iwona ĝiris la interŝanĝan labormonon al nia konto.
- UEA sendis pli klaran informon pri niaj UEA-kontoj.
- Restas malklaraĵo pri la interezo kiun liveris nia konto ĉe la Kredietbank. Eddy esploros kaj raportos dum la venonta kunveno.

La ĉeestantoj aprobas la kontaron; ĝi estos prezentita al la membrokunveno en Eeklo.
Montriĝas ke la konto ĉe FEL enhavas pli da mono ol necesas. Eddy ĝiros 15000 frankojn el tiu konto al nia depona konto, cele al akiro de rentumo.
FLEJA ricevas subtenon financan de pluraj ne-junuloj. Patrick preparos leteron per kiu ni esprimas nian dankon al tiuj personoj.

3. Venonta semajnfino

An prezentas la ĝisnunan preparlaboron pri la semajnfino. Estas 14 aliĝoj, inter kiuj kelkaj nederlandanoj. An kaj Patrick telefone invitos la nealiĝintajn membrojn partopreni en tiu renkontiĝo kaj la tiama membrokunveno.

4. Diversaĵoj

La 22an de junio okazos vizito al la franca urbo Lille, kiun organizas la lokaj Esperantistoj. FLEJA-delegacieto partoprenos.
En Eeklo ni vidos ĉu estas sufiĉe da intereso por grupa partopreno en "De Gordel".
Pro la propaganda agado de SEL (Skolta Esperanto-Ligo), ni refoje kontribuos per 2000 frankoj.
Venonta kunveno okazos en Eeklo, la 30an de junio.

Kiu kion ?
An kaj Patrick telefone invitos la membrojn ĉeesti en Eeklo.
Eddy:
- esploros ĉe FEL pri Pasporta Servo,
- kontrolos la Kredietbank-rentumon,
- transĝiras 15000 frankojn de FEL al nia depona konto,
- ĝiras 2000 frankojn al SEL,
- petos informojn pri "De Gordel".

Patrick preparas dankleteron por niaj subtenantoj.

Protokolanto: André Ruysschaert